



TRA LA MONDO ESPERANTO SEMAS SIATN BONAĴOJN ·
 PLIFACILIGAS LAKOMERCAJN · INTERRILATOJN · KONIGAS ·
 LA · INDAJN · ELTROVOJN · KUNHELPOS · POR · ANSTATAVI ·
 DE · FRUKTODONA · PAÇO · LA · SANGAJN · BATALADOJN ·
 KIUJ · DISSTRAS · HOMARON ·



Pillel

Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francau Romau lernejon post ricevo de V' granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

Paĝo.

Nuntempaĵoj : La Premioj de Nobel en 1905, de J. Lundgren, el Hedemora, kaj P. Nylen, el Stockholm (Svedujo)	97 ^a
En Finnlando, de S. L., instruisto (Finnlando)	99 ^a
La Norvega reĝa familio (Norvegujo)	100 ^a
Pri Esperanto : Kroniko, Movado esperantista kaj Bibliografio, de A. Montrosier kaj Steleto (Francojo).	101 ^a
Literatura paĝo : La kuko de l' reĝoj, de E. d' Hervilly, esperantigita de Johanino Flourens, el Beziers (Francojo)	103 ^a
Diversaj sciencoj (Geografio) : Hindujo, de Adinarayana Chettiar (Hindujo), kun portreto de l' aŭtoro	104 ^a
Artista kaj literatura vivado : La Insulo de l' poeto, (Kuba), de Funck Brentano, esperantigita de E. Bacquet, (Francojo)	106 ^a
Teatro : Ĉe la Arenoj en Béziers dum 1906, de J. Flourens ; Gabrielle Krauss (Aŭstrujo)	107 ^a
Diversaĵoj : Alĝeriaj skizoj, de Bledamanto (Alĝerio)	108 ^a
Virina paĝo : Modoj de l' pasinta tempo — La Krinolino, de J. Flourens	109 ^a
Felietono : Judith, ilustrita originala novelo, de Fino Oxenford, el Brighton (Anglujo)	110 ^a
Miksaĵoj : Por la propagando ; Rezultatoj de l' unuaj konkursoj ; Problemoj	112 ^a

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Sendu ĉiujn dokumentojn (*krom miksaĵoj*) al S^o Montrosier, 8^{bis} Rue de l'Ecu d'or, Orléans, (France). Miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France). *Atentu pri la nova adreso de S^o Montrosier.*

Sendu mendojn KUN MONO al :

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenalore.

Registara novjara donaco al « Tra la Mondo »

La 1^{an} de Januaro 1906, « Tra la Mondo » estis enskribata en la oficialan nomaron de l' periodaj gazetoj al kiuj oni povas aboni ĉe la francaj poŝtoŝeficejoj.

La administracio de la Revuo prenas sur sin la koston de l' mandatoj.

Do, de nun, oni povas aboni, sen pluaj elspezoj, al « Tra la Mondo » en ĉiuj francaj poŝtoŝeficejoj.

Tiu rezultato, tre honoriga por la Revuo, tre ŝatinda por la abonantoj, kiuj plu ne havos enuon kaj elspezon haviĝi kaj sendi mandaton, estas ankoraŭ tre valora por Esperanto.

Dank' al « Tra la Mondo », nia lingvo atentigis oficiale la gravan ministrajon de l' Poŝtoj kaj Telegrafoj, kiel estis atentigata la Ministro de l' militaĵoj, kaj konsekvence de l' maraĵoj, dank'al la klopodoj de nia ĉefredaktoro.

Se oni pripensas ke ĉiuj poŝtoŝeficejoj ricevis avizon pri la nuna ebleco aboni al « Tra la Mondo revuo esperantista », oni komprenos ke tiu simpla avizo estas grava akiritaĵo por nia afero. Ni do povas prave ĝoji pri ĝi, kaj ni estas feliĉaj montri, per pruvoj, ke nia revuo ne longe atendinta, iĝis serioza apogpunkto por nia afero.

LA NACILINGVA GAZETARO.

Alia pruvo estas tiu fakto, ke gravaj naciaj gazetoj parolas favore por « Tra la Mondo ».

Post kelkaj konataj francaj ĵurnaloj, la fama « *Frankfurter Zeitung* » dediĉis laŭdajn vortojn al ĝi, kaj la bohema « *Narodni Politika* » el Praha, raportas favore por nia revuo pri la bohema artikolo de nia 6^a numero (La 4^{an} de Jan.)

« Tra la Mondo » pravigas do, kaj eĉ plue, la diritaĵon de l' rebuso de l' 1^a numero (vidu Miksaĵojn); ĝi pravigas ankaŭ la opinion eldiritan de S^o Carlo Bourlet en la lasta numero de « *Esperanto* », t. e. ke ĝi estos la esperantista « *Illustration* »; kaj tiu juĝo estas tiom pli ŝatinda ke oni neniel povas suspekti S^{on} Carlo Bourlet je particeco por ni

La administranto.

NIA VENONTA NUMERO

Enhavos artikolojn pri **Hindujo**, de S^o Simper; **Tunizio**, de S^o Nicolas; **Svedujo**, de S^o J. Lundgren; **Hispanujo**; **Rusujo**, de S^o Morgan; **Alĝerio**, de Bledamanto; **Aŭstrujo**, k. t. p.

BALDAŬ.

« **La Torento el Saŭmo** » Romano de l' fama tranca aŭtorino DANIEL LESUEUR, esperantigita kun ŝia permeso de JOHANINO FLOURENS.

NUNTEMPAĴOJ



Medicino: R. KOCH.



Pacifismo: BERTHA VON SÜTTNER.



Literaturo: HENRYK SIENKIEWICZ.

La premioj de Nobel en 1905

De JOHN LUNGGREN kaj PAUL NYLEN (Svedujo) (1).

Ĉiujare okazas en la tago 10^a de decembro soleno simpla sed grava en Stokholmo, la ĉefurbo de Svedlando.

Tiam la eminentuloj, kiuj ricevas en la estanta jaro la premion de NOBEL, alvenintaj Stokholmon akceptas de la mano de l' sveda reĝo, Oskaro II^a, la premian sumon kaj diplomon.

PAUL NYLEN.

La solena transdono de la sciencaj kaj literatura Nobel-premioj de tiu ĉi jaro okazis dimanĉe, la 10^{an} de decembro, kiel la antaŭaj jaroj, en la granda salono de l' muzika akademio en Stokholmo.

La soleno komencis je la tria horo, kaj, post enkonduka parolado de l' universitata kanceliero Boström, la premioj estis konigitaj per paroladoj de la riprezentantoj de la premiodecidintaj institutoj.

La premio je fiziko estis donita al Pro D^{ro} Philipp Lenard el la universitato en Kiel, kiel rekompenco pro liaj esploroj pri la katod-radioj; kaj la ĥemia al Pro Adolph von Baeyer el la Munhena universitato, precipe pro liaj eltrovoj pri la produkto de indigo kaj aliaj kolorigiloj el ŝtonkarba gudrono. Ĉar la du nomitaj premiitoj ne ĉeestis, la germana ministro von Müller, kiel ilia riprezentanto, ricevis la premiojn.

La medicinan premion ricevis la fama germana kuracisto Robert Koch pro siaj esploroj kaj eltrovoj

koncernantaj la tuberkulozon. Pro Koch, kiu mem ĉeestis, ŝajnis atente aŭskulti la detalan paroladon, el kiu li supozeble komprenis nur la sciencajn vortojn. Dum aplaŭdoj de la aŭdantaro li mem prenis el la manoj de la reĝo siajn diplomon, bankĉekon kaj medalon.

Fine la sekretario de l' Sveda Akademio surpaŝis la tribunon kaj sciigis, ke la literatura premio estas aljuĝita al la pola verkisto Henryk Sienkiewicz, komentariis lian verkadon, kaj ĉesis per franclingva dediĉo al la premiito. Ankaŭ tiu ĉi ĉeestis, kaj ricevis de la reĝo sian premion. La literatura premio ja estas tiu, kiu plej el ĉiuj interesas la nesciencan publikon, kaj la ovaciaj aplaŭdoj, pro tio, longe daŭris.

Post tiu ĉefa soleno, proksimume du cent personoj kunvenis en festenan ĉambraron de Grand Hotel, kie tagmanĝo estis aranĝita. En la ĉeestantoj oni trovis

(1) Nia lerta kunlaboranto, S^o John Lunngren, kaj nia tiel konata samideano, S^o Paul Nylén, eksredaktoro de « Lingvo Internacia », havis la bonegan ideon sendi al ni artikolojn pri la disdono de tiuj premioj, okazintaĝo, aparte internacia.

Ni donas ĉi supre eltiraĵojn de iliaj artikoloj, kiuj, tre feliĉmaniere, plengigis sin unu la alian.

(2) Ĉiama sekretario de la Literatura Akademio Sveda.

S^ojn Sienkiewicz kaj Koch, S^ojon Koch, la reĝajn princojn Gustaf Adolf, Karl kaj Eugen, la germanan ministrin von Müller, kaj baronon Stael de Holstein kiel riprezentanton de la rusa legacio.

La sekretario de la Sveda Akademio, S^o af Wirsen, toastis en franca lingvo por S^o Sienkiewicz, kiu en sia respondo — ankaŭ franclingva — diris proksimume jenon:

« La nacioj de l' tutmondo estis en la konkuro pri la literatura premio reprezentataj de siaj poeziistoj kaj verkistoj. Sekve la eminenta areopaĝo decidanta tiun ĉi rekompencan, kaj la nobla monarĥo liveranta ĝin, ne nur glorigas verkiston, sed samgrade tiun nacion, kies filo ti estas. Per la premio ili atestas, ke tiu nacio partoprenas en la universala laborado, ili atestas, ke ĝia penado sukcesas, kaj tiel, ke ĝi rajtas vivi por la progreso de l' homaro.

Tiu ĉi honoro, ŝatinda por ĉiu, estas ankoraŭ pli multevalora por iu, filo de Polujo. Oni diras, ke Polujo estas mortinta, sed jen estas pruvo, ke ĝi vivas; oni proklamis ke ĝi trolaciĝis kaj sklaviĝis, sed jen estas pruvo, ke ĝi agas kaj venkas. Kiu ne devas pensi — kvankam eble senkonscie — pri la vortoj de Galileo: « ĝi tamen moviĝas », kiam antaŭ la okuloj de l' tutmondo tia aprobo estas donita al la signifo de la polaj agado kaj kreadforto?

Pro tiu ĉi honoratesto — ne al mi mem, ĉar la pola fundo estas fruktema kaj havas verkistojn, kiuj superas min — sed al la pola laborado, al la pola kreado, mi, kiel Polo, dediĉas plej varman, plej sinceran dankon al vi, sinjoroj membroj de l' Akademio. »

Pro grafo Mörner parolis en germana lingvo por

Pro Koch. Tiu ĉi respondis per parte ŝerca, parte serioza parolado. En sia simpla, senordena vesto li aperis kiel unu el la kondukantoj de la scienco; kaj kun memŝatiĝo li parolis pri siaj propraj eltrovoj, iom senkompate atakante kontraŭulojn. Iom post iom — laŭ lia diro — la vivado igis lin nesentema tiel je laŭdo kiel je mallaŭdo, sed tamen tiu honoratesto, kiu nun trafis lin, faris profundan impreson al li; ĝi estas ankaŭ la plej eminenta, kiun scienculo povas atingi.

Laŭ telegramoj el Kristiania la Nobela premio por pacifismo estas donita al la konata Baronino Bertha von Süttner.

La premioj en 1905 — kiel oni trovas — ne laŭvorte plenumas la decidon de la donaculo, ke la premioj rekompencos plej indajn meritojn en ĉiu jaro; sed tiun postulon ne plenumis ankaŭ la premioj en la pasintaj jaroj. Scienculoj aŭ verkistoj, esploroj, eltrovoj aŭ verkoj ne tiel rapide atingas sukceson kaj publikan akcepton. Oni devas kontenti, se premio estas donita al homo ankoraŭ ne ĉesiginta sian agadon.

Oni — precipe la Esperantistoj — eble pensos, ke unu aŭ alia el la premioj povus esti donita al pli merita persono, sed tamen neniu povas ĝuste diri, ke iu el la premiitoj estas malinda je sia rekompenco.

El gazetaro resumis

JOHN LUNDGREN.

(La 15^{an} de Decembro 1905).

Parolado de S^o af Wirsen.

« Kie ajn la literaturo de nacio vivas ankoraŭ riĉan kaj neesplorableblan vivon, tie ankaŭ estas garantita la ekzistado

de tiu nacio, ĉar la floro de l' kulturo ne povas elkreski sen tero por ĝermi sed en ĉiuj nacioj troviĝas iaj malofiaj geniuloj, en kiujla Genio de la nacio kunigis siajn povojn; ili staras antaŭ la mondo kiel la reprezentantoj de la spirito nacia. Ili flegas la memorajojn de la nacio el pasintaj tagoj, sed por fortigi ĝian esperon je l'estonteco. Ilia poeta verkado enŝovas fortajn radikojn en la pasintajn tagojn, kiel la grandega kverko de Baublis en la sovaĝan teron de Litvujo; sed la arĥkrono murmuris en la vento de l' tago. Tia reprezentanto de la literaturo kaj kulturo spirita de nacio estas tiu viro, kiun la Sveda Akademio en tiu-ĉi jaro distingis per la premio de Nobel. Li ĉeestas en nia rondo, kaj lia nomo estas Henryk Sienkiewicz. »

Sekvis parolado raportanta pri liaj « Pan Wołodyowski kaj Basia », « Zagłoba » kaj « Quo vadis ? »

Post tio D^{ro} af Wirsen finis per la vortoj sekvantaj.

« La literatura produktado de Sienkiewicz ankoraŭ neniel ĉesis. Ii nun estas okupata je la publikigado de granda trilogio kun ŝtofo el la tempo de Sobieski kaj nomata « Sur la kampo de la gloro. »


Sur la kampo de la gloro antaŭeniris lia poeta vojo mem. De sia nacio li ricevis karajn pruvojn de amo, tiom pli valorajn ke en sia flama amo al la patrujo, li neniam flatis la nacion. Kiam li festis sian 25-jaran jubileon verkistan, oni aĉetis kaj donacis al li, per granda ennacia monokolekto, la ĉevaliran bienon, kiu estis dekomence lia gepatra hejmo; deputataron vizitis lin; li ricevis adresskribajojn, kaj festa prezentado estis farata je lia honoro en la teatro de Varsovio.

Al tiuj esprimoj de admiro estas aldonita nun honoraĵo de la alta nordo, kiam la Sveda Akademio decidis transdoni la Nobel-premion literaturan de la jaro 1905 al Henryk Sienkiewicz. »

Esp. P. NYLEN.

Hemio: ADOLF BAEYER.

Fiziko: LENARD.



En Finnlando.

Du partioj militas por la supereco en nia lando La *Rusa* kaj la *Sveda*. Ni havas ja nian propran konstitucion, kiu estas tiel propra, ke ni estas nur unuigitaj kun Rusujo. Sed krom tio, la rusa monarkio agis kontraŭ ĉiuj leĝoj, ne demandante la opiniojn de niaj naciaj Parlamento kaj Senato.

Dume oni sendis Bobrikoff kiel ĉef guberniestro de nia lando. Tiu ĉi disrompis niajn rajtojn kaj agis diktatore. La *Sveda* parto de la Senato forlasis siajn aferojn por protesti, sed la Finoj opiniis ne protesti, tial ke Rusujo estas pli forta. La Finoj restis, kaj pensis diplomate savi tion, kion ili povus savi. Estis saĝe; sed la Svedoj vidante sian eraron en *libera foriro*, malamegis la Finojn tre fervore.

Oni fondis « Klikki » t. e. konstitucianojn por forbatali la Finojn. La Rusoj eniris en nian landon kiel ĝendarmoj, guberniestroj k. t. p. La Finoj ne foriris, sed atendis plibonajn horojn. La horo venis. Dank' al la Finoj, la Rusoj ne ĉion venkis. Revoluciaj skribaĵoj en Rusujo montris al ni ke la horo proksimiĝas. Ĝenerala striko de la fervojaj oficistoj, dum pli ol unu semajno, ĉion ŝanĝis. La tuta lando estis kiel unu sola homo: ni ĉesigis la cenzuron kaj ni ne aŭdis la diktatorojn. Terura malamo vekigis inter niaj partioj, la Fin-Sveda konstitucia kaj la Fina « nacionalista »: La malamo pli kaj pli brulas, kaj ni povas atendi terurajn naciajn fratatakojn kaj bataladojn. Ni nun estos liberigitaj de la Rusa « Burokratio » sed granda terureco en propra nacio povas konduki nin en grandegan malfeliĉecon.

La dudek unuan tagon de venonta decembro kunvenos la Parlamento; oni ne povas scii tiujn kiuj venkos. Se la konstitucianoj venkos, estos kredeble novaj strikoj, kaj bataloj. Se la « nacionalistoj » venkos, ni ricevos novan konstitucion demokratian, kaj unuĉambran Parlamenton.

La granda ĝenerala striko daŭris de la 5^a ĝis la 13^a de novembro. Nenia gazeto aperis, la poŝto ne funkciis, nenia estis la negoco... ĉiuj strikis...

Ni forpelis la rusajn ĝendarmojn kaj mortigis kelkajn, sed ekster tio, estis « fred » (paco) en la lando...

Decembro 1905.



HELSINGFORS. — STATUO DE ALEKSANDRO II^a.



HELSINGFORS. — L'UNIVERSITATO.

La lastan 20^{an} de Decembro la monarko kunvokis, kun nia nova, aristokrata Senato, nian kvarĉambran popolan reprezentantaron por diskuti pri tre gravaj aliformigoj en niajn konstituciaĵojn.

1^o Starigo de popola reprezentantaro unu = aŭ duĉambra, laŭ la popola opinio. La popolo tuta deziras la unuĉambran, sed la nobelaro duĉambran.

2^o Libera voĉdonrajto por ĉiuj dudekunu — jaraj viroj kaj virinoj, sen iaj malpermesoj.

3^o Tuta propra konstitucio fina.

Kredeble nia kvarĉambra « Parlamento » ne plu kunvenos post tiu ĉi fojo. La tuta popolo estas tiel, kvazaŭ unu sola homo, en milito kontraŭ la duĉambristojn aŭ aliajn aristokratojn, ke ĝi devas venki.

La afero ne estas nur batalado inter supra kaj malsupra parto de l' loĝantaro; ĝi estas nacionalista milito inter la partio nombra je 2,500,000 kaj la Sveda je 250,000.

Ĉiuloke en la tuta lando estas fonditaj naciaj militantaroj; kaj pafiloj kaj paflegoj estas alportitaj en la landon el ĉiuj flankoj. Se la regnestro ne volos plenumi la popolajn dezirojn, estos batalado sendube.

La unua el la militagoj estos tutlanda striko en ĉiuj vivfakoj, se la Parlamento ne laboras laŭ la popola opinio.

La militilojn, oni ne disdonis al la viroj por ne vekigi dubojn en la rusa lando pri nia celo difinita. Efektive la batalo kontraŭ la rusa politiko estas kaj estos nur abstrakta, ĉar neniu pensas pri disigo de Rusujo, sed nur atingi denove niajn rajtojn; en Rusujo ni havas multajn amikojn.

Kiam oni bezonos la armilojn, ili estos disdonataj en unu aŭ du tagoj ĉar la laboristoj prenos la fervojojn kaj aliajn agadrimedojn en siaj manoj por sia uzado.

Ŝiaflanke la Senato disdonas monon kaj militilojn, sed oni ne povas profeti kiu parto venkos.

Ĉiuokaze, interesajn horojn ni vivas. Batalo kontraŭ la granda Rusujo kaj ĉe nia propra lando!

Ĉu nia kara nacio povos heroe tratabi ĉi tiajn grandajn horojn, aŭ ĉu la ĉiuvira morto ĝin atendas? Aŭ ĉu ni venkos senbate?...

La 9^{an} de Januaro 1906.

El leteroj de S. L.

Fina Instruisto.

En Francujo.

La 17^{an} de Januaro, S^o Fallières, Prezidanto de l' Senato, estis elektata kiel Prezidanto de la Franca Respubliko.

La Norvega reĝa familio.



LA NORVEGA REĜINO
(Princino Maud el Danujo)

Ph Downey



LA HEREDONTA PRINCO OLAF
(Princo Aleksandro)



HAKON VII^a, NORVEGA REĜO.
(Princo Karolo el Danujo)

R1 «Annales»

Pro manko de spaco, ni ne povis pli frue enpresii interesan artikolon kiu, nun, perdis sian nunecon. Ni tamen donas tie ĉi la portretojn, kiuj estis akompanontaj la artikolon. Ili ebligas juĝi kiel, vide, estas simpatiaj la nova reĝo, elektita unuvoĉe de la norvega « Storting », lia reĝino Moŝto kaj ilia juna ido.

Je la momento de l' voĉdonado la estroj de l' respublika kontraŭularo sciigis ke ili tuj donos sian voĉon al princo Karolo, ĉar ili kliniĝas antaŭ la volo libere elmontrita de l' plimulto de Norvegoj. Hakon VII^a akceptis simplece la kronon, kaj elektis kiel devizo: « Ĉio por Norvegujo. »

☞ Bela akcepto estis farata al la nova dinastio, al la gereĝoj kaj al la juna princo Olaf, de l' Norvegoj, kiuj ne havis nacian reĝon de kvar cent jaroj.



SRO ĈEFEĈ
Anglujo.



P^{ro} OTTO SIMON
Austrujo.



P^{ro} CHRISTALLER
Germanujo.



P. NYLEN
Svedujo.

Leteroj de Hispanujo — Personaj dankoj — Pri Esperanto: Bibliografio, Diversaj sciigoj, la Albumo de konataj Esperantistoj, la Esperantista movado dum 1905.

Okaze de la katalunuja letero empresita en nian 6an non, mi ricevis de Hispanujo leterojn de kelkaj ĉi-tiulandaj amikoj, inter kiuj de niaj kunlaborantoj: Sroj Codorniu, je l' nomo de l' hispanaj Esperantistoj, kaj Vicente Inglada Ors, je tiu de l' esperantistaj oficiroj.

« Ĉiuj Valenciaj militistaj Esperantistoj — skribas la lasta — protestas plej indigne pri la letero dirita, kiu nur enhavas kalumniojn al la hispana militistaro, uzante nur malveron kiel ĉefan argumenton. »

Kaj So Vicente Inglada aldonas ke, se la oficiroj agis kiel ili faris, estas pro grava ofendo farita al la patruja standardo « ofendo tiel grava, ke mi hontegas nur pensante pri ĝi kaj tial silentas pri tio. »

Miajn personajn sentojn pri la estimego ŝuldata al tiu alta patruja simbolo, mi ja tre klare esprimis en la enkonduka artikolo de tiu revuo. Bedaŭrante esti nesciinta la gravan ofendon, kaŝe aluditan de mia korespondanto, mi do tre volonte kaj kore esprimas lian proteston pri la malkontentiga okazintaĵo, pri kiu li skribis al mi.

Volonte ankaŭ, mi donas al li akton pri lia protesto rilatanta la agadon esperantistan de oficiroj en Katalunujo :

Neniu malnova Esperantisto nescias ke en Barcelono « militisto faris la unuan kurson esperantan, kio pravas, ke la militistoj hispanaj agis plej favore al Esperanto kaj neniam baris ĝian vojon ».

Longatempse sur la kovrilo de « Suno Hispana » oni povis legi, ke la ĉefredaktoro, Sro Vicente Inglada Ors loĝas en Barcelono; kaj lia fruktodona agado estis, antaŭ nelonge, certigata dum la Bulonja kongreso mem, per la enskribo de lia nomo en la lingvan komitaton.

Do ŝajnas ke neniu en Barcelono povis voli nei tiun veron; kaj ni ne komprenis la frazon krimigitan kiel niaj korespondantoj. Estas vere ke, en la varmo de l' malpacetoj, eble ili ne havis sian tutan posedon de si mem, kiel tio okazas ofte; kaj ja tion pravas la postulo elskribita en du leteroj ricevitaj.

Certe iliaj aŭtoroj, nune, ĝin bedaŭros, ĉar ili ne povas opini, dum plena posedo de si mem, ke franca redaktoro estas denunciato.

Neniel do ni ne volas, niavice, koleri; sed la fakto montras ke, ĉe tiaj okazintaĵoj, en kiuj lingvaĵo ludas rolon, oni bezonas iom da indulgo.

Ni esperu ke ĝi venos kun forgeso, kaj ke Esperanto ne suferos en Barcelono de l' priparolata afero. Letero ricevita de tiu urbo ebligas al ni havi tiun esperon.

Tiu afero montras ankaŭ ke Esperanto neniel malutilas la gepatrajn lingvojn; kaj tiu nova konstato estas ĝojigaĵo en tiu bedaŭrinda okazintaĵo.

Ĝi, fine, alvokas kelkajn pripensojn: tre ofte, por ne diri ĉiam, ni nescias tute tion, kio okazas en aliaj landoj. Nur per ĝenerala komunikilo oni povos, iom post iom, esti informata pri aferoj tute ne konataj ĝis nun. Sed, kompreneble, por ke neniu havu rajton koleri aŭ ofendiĝi, estas necese ke la raportantoj estu sinceraj kaj verdirantaj.

Kun tiuj kondiĉoj, kiuj laŭ la protestintoj nomitaj ne estus plenumitaj de nia korespondanto kataluna, ŝajnas al ni ke neniu povas ofendiĝi se aperas en revuo esperantista rakont-

oj similaj al tiuj enpresataj ĉiutage en ĉiunaciajn gazetojn.

Postuli ke niaj nepropagandaj revuoj limigu sin ĉe senkolora, neutra informado, ne aludante al tio, kio faras la vivon de l' nacioj, estus dediĉi tiujn revuojn al la plej enuiga kaj morta unutoneco. Kaj pri kio povos raportti la oftperiodaj gazetoj aŭ ĵurnaloj, dezirataj de multaj, se oni malpermesas al ili pritrakti temojn de ĉiulanda politiko?

Ni ne pensas ke tia postulo estas akceptebla, sed ni konsentas ke tre granda singardemo estas neceseĝa.

Tre korajn dankojn mi sendas al la multaj amikoj, konataj kaj nekonataj, kiuj gratulis min pro mia edziĝo kaj kiuj sendis al mi siajn memorojn kaj dezirojn okaze del' nova jaro.

La sento de l' valoraj amikecoj, kiujn donis al mi mia esperantista agado, estas al mi tre dolĉa, kaj nur pro tio, eĉ se mi ankoraŭ ne havus multajn aliajn kaŭzojn por tiel fari, mi benus la tagon en kiu mi konatiĝis kun Esperanto.

Oni bonvolu min senkulpiĝi, se mi ne respondis al ĉiuj, pensante al la terura laboro postulata de revuo tia, kia tiu ĉi, kaj konsenti pri la neceseĝo mia doni ĉiujn miajn liberajn minutojn al ĝia direktado.

A. MONTROSIER.

BIBLIOGRAFIO.

Sro CHAVET sendis al ni lertan tradukon de kurioza Firenza novelo: « Grasa Lignaĵisto ». La aŭtoro opinias ke oni devas uzi Esperanton por diskonigi verkojn ne tradukitajn en multajn lingvojn, kaj li elektis novelon de l' XV^a centjaro, kiu enpenetrigas nin en la vivon de l' artmetiistoj, iom kruelaj en siaj ludoj.

La broŝureto enhavas interesan bibliografian antaŭparolon (1).

Pri Sro CHAVET, ni korektu erareton de nia lasta kroniko. La grupo de Louthans estis ne la unua, sed la dua, en Francujo. La unua estis la « Societo Esperantista Reims Soissons » fondita en 1894, kiel tiu de Louthans, de junulo, Sro Henri Husson, nun leŭtenanto en Arras. Sro de Beaufront, kiu sendas al ni tiun sciigon, kaj kiu subtenis tiujn du junajn grupojn aldonas: « Al kiuj mirus pri tia agado nur en kvazaŭ infanaro, mi klarigus la aferon dirante: Sro René Lemaire (tiam li mem tre juna) kaj mi devis propagandi ĉe la junuletoj, eĉ la infanoj en tempo, kiam la maturaj homoj respondis per rido, moko eĉ insulto al nia penado. »

Eĉ nun, kiam la situacio estas tre progrese ŝanĝiĝinta, infanoj devas esti nia celo. Kaj fakte, estas vere tiel. En la Decembra numero de « L'Espérantiste » mi legis plezure sciigon pri propono farita ĉe la *Urba Konsilantaro de Parizo*, de Sro Hénafe, membro de tiu ĉi, por fondo de Esperanta kurso en la superaj unuagradaj lernejoj de la urbo Parizo. Ni varme deziras ke tiu propono, pri kiu raportas la « Oficiala urbestrara Bulteno », estu akceptata.

En la sama n^o de « L'Espérantiste », meze de plena nomaro de profesoroj de Esperanto, ni rimarkis plezure multajn diversgradajn profesorojn kaj instruistojn. Fine la 16^a n^o de l' franca « Esperanto » konigas ke *pli ol 1000 francaj edukistoj* okupiĝas pri Esperanto.

Por reveni al « L'Espérantiste », ni konigu tre pravan artikolon titolitan « Oni parolas Esperanton » en kiu la aŭtoro

(1) — 0 fr. 70, aŭ frankite, ĉe « Tra la Mondo ».

donas fundamentojn por krei en ĉiuj urboj informojn por veterantaj Esperantistoj. Tre leginda estas tiu artikolo (1), kiun, pro manko de spaco, ni povas nur montri. Ni memoru ankaŭ ke «L'Espérantiste» estas sendata senpage kaj regule de l' Administracio al la hotelestroj kiuj promesas ĝin lasi sur la tablo de sia salono.

En «Esperanto» (nº 16) ni legis ankaŭ sciigojn pri agado farata apud estroj de hoteloj, restoracioj, bazaroj, k. t. p. por instigi ilin lernigi Esperanton almenaŭ al unu el siaj oficistoj pro la kongreso okazanta dum Septembro. Oni konigos nomojn de urboj kaj ĉiuspecaj firmoj en kiuj oni povos trovi oficistojn « parolantajn Esperanton », kaj tiel faciligi por Esperantistoj renkontiĝon kun samideanoj. Ni tre rekomendas tiun iniciativon ŝuldatan al S^o Lambert, ĉefredaktoro de «Esperanto», al kies agado nia afero tiom ŝuldas. Ni donos la ĉi suprajn sciigojn pri niaj komercistaj svisaj abonintoj plenumantaj tiujn kondiĉojn.

La 15^a n^o enhavas ideojn subskribitajn «L'Administranto», kiujn ni tute aprobas, ĉar tie ĉi mem ni elskribis similajn, pri partoprenado de ĉiuj en la diskonigo de Esperanto per diskonigo de revuoj kaj gazetoj kaj de propagandiloj.

Pri tiuj lastaj nia ĉefredaktoro longe ĝin diris en artikolo de «Lingvo Internacia», kunhelpo ebligas multe kun mini muma elspezo, tiam kiam penadoj sen ligiloj elspezigas multe, donante malgrandajn rezultatojn.

Ekzemple, la afiŝoj estas tre kostaj kiam oni presigas ilin po malgrande, ĉar la valoro de la komposto ŝarĝas peze tiun de ĉiu afiŝo. Ju pli la nombro grandigas, des pli la rilata valoro de la komposto malpligrandigas.

Aplikante tiun principon, «Esperanto» eldonis multkoloran afiŝon, kies prezo estas nur 8 f 50 afrankite por ĉiu cento.

Ŝajnas al ni tute konsilinde al la grupoj havigi almenaŭ unu specimenon de tiuj afiŝoj. (2).

Ni ricevis la 1^{an} n^{on} de «The British Esperantist» sub ĝia nova formo. La propaganda parto estas ĉiam plena kaj la kutima enhavo de «The Esperantist» estas nun en la aldono.

Ni kore deziras al nia kunfrato ĉiamajn progresadojn, kiuj atestos antaŭeniradon de Esperanto ĉe la anglalingvaj popoloj.

Nova citinda iniciativo de «Germana Esperantisto»: La administracio disdonas senpage al ĉiuj germanaj gazetoj apartan folion enhavantan la «Esperantistan movadon en fremdaj landoj».

La germana esperantistaro ankaŭ meritas laŭdojn pro ĝia organizacio: la diversaj ĉefaj grupoj dividis inter si la propagandan laboron, sin okupante speciale: la *Hamburga* pri la komercistoj, la *Frankfurta* pri la gazetaro, la *Berlina* pri la sciencularo, la *Viena* pri la blinduloj, la *Brunsviga* pri la germana esperantista jarlibro.

Albumo de konataj Esperantistoj

Ni scias jam ke tiu grupo okupiĝas pri starigo de interesa albumo de konataj Esperantistoj.

Ni enpresas hodiaŭ kvar portretojn eltiritajn de tiu albumo, afable senditajn al ni de S^o Fr. Schuck, kiu speciale okupiĝas pri la eldono. Ni varme konsilas la akiron de tiu albumo, kiu kostos nur 2 frankojn afrankite, kaj ebligos por multaj koni almenaŭ portrete, personojn kiujn ili ŝatas pro ilia agado aŭ iliaj verkoj.

Jen estas niaj kunlaborantoj kaj fervoraj propagandistoj. Pro; Christaller, kronikisto de «Germana Esperantisto» kaj Otto Simon, kiu, inter multaj aliaj valoraj akiroj, gajnis al Esperanto Sinjorinon Bertha von Suttner; jen estas nia hodiaŭa kunlaboranto, S^o Paul Nylén, el Stockholm, unu el la estroj de l' sveda esperantista movado, ano de l' lingva komitato; jen estas fine energia kaj agema agadhomo, S^o Ĉefeĉ, kies kreitaĵoj: la konataj *ŝlosiloj*, estas ja mirindaj kaj admirindaj propogandiloj, kiujn ĉiu devas koni. Bonegaj ankaŭ estas liaj propagandaj poŝtkartoj.

La albumo, rimarkinda propagandilo ankaŭ, aperos en Marto 1906. (3).

Inter diversaj ricevitaj dokumentoj, mi citos «The Crank» angla revueto kun artikolo de nia konata samideano D^o Hugon (Londono), pri la neceseco kaj ebleco de internacia lingvo; rimarkinda parolado de C. Thiaucourt, profesoro ĉe la Universitato en Nancy.

Jen tri novaj esperantistaj revuoj: «Unua paŝo», bulgara, parolanta pri la moroj de l' lando (S. Petkov., 26, Strato San-Stefanc, Sofia — 3 fr.); «La Esperanta Studento», tre bonega interkomunikilo, eldonita de la Brighton kaj Hove esperantista klubo, kaj sprite kondukata de nia kunlaborantino, Rino

Oxenford. (2 f. 16, Upperwestbourne Villas, Hove, Sussex, England).

Inter aliaj bonaĵoj, la revueto enpresos tekstojn de l' klubanoj kun apudaj korektoj; verkojn modelajn (oni komencas de D^o Zamenhof), interŝanĝon je demandoj kaj respondoj. Ni diru fine ke la revuo ricevis de l' fama angla aŭtoro Rudyard Kipling permeson por traduki rakontojn el la «Junglo».

La tria, «Internacia Revuo Medicina» estas presata multlingve. Tio ebligos uzi ĝin kiel propagandilon, kio ne estas tiel facila kun «Internacia Scienca Revuo». (12 fr. ĉiujare — 33, Rue Lacépède, Paris).

Jara Movado.


Ni donas ĉi sube kurbojn montrantajn la kreskadon de l' esperanta gruparo, dum 1905, en Anglujo, Francujo kaj Germanujo. La kurboj deiras de sama punkto por ke oni pli facile povu kompari ilian iradon.

Pro manko de sufiĉe precizaj sciigoj, ni ne povis desegnigi similajn kurbojn por aliaj landoj nek por la tuto de l' grupoj.

Tiu desegno montras ke 1905 povas ankaŭ fieriĝi pro la progresoj de Esperanto. Pri la angla movado, ni memoru l' agadon de «Daily News» la fama angla gazeto kiu, skribas S^o H. Clegg, en amuziga statistika artikolo, jam enpresis 24.390 vortojn esperantajn, en multaj artikoletoj ĉiutagaj. (*Vidu la malgrandan korespondadon*).

La jaro jam bone komencis kaj hodiaŭ mem mi ricevas bonegajn sciigojn pri parolado farita en la fandejoj de «Creusot» de nia kunlaboranto S^o Bord, al kiu estis tre utila nia lasta numero.

STELETO



(1) Unu numero fr. 0.50.

(2) Prova afiŝo kontraŭ 1 poŝtmarko; 1 stampila kontraŭ 2 poŝtmarkoj, el ĉi ajn lando.

(3) Prezo fr.: 2, afrankite. Sin turni al Fritz Schuck, Bräunschweig, Thomaestrass 16 (Germanujo).

Monologo de ERNEST D' HERVILLY (Francujo).

La reĝo trinkas! La reĝo trinkas! La rrrrrreĝo trinkas!!!

Ha! La monstroj! Kiom ili suferigis min per tiu ĉi krio ian Epifanian vesperon, antaŭ... Ni silentu!... Tio okazis en la tempo kiam mi ne havis ankoraŭ du blankajn haretojn en mia barbo, maldekstre; flanko de l' koro, Sinjorinoj!

Cetere, ĉe la priparolata epoko, mi ne havis jam barbon, pro la simpla kaŭzo ke la ĉielo, malgraŭ fervoraj preĝoj sekvitaj de ŝmiro per ursgraso, donis al mi la unuajn haretojn nur post dek jaroj.

Do, ian Epifanian vesperon, antaŭ tre, eĉ tro longatempе, oni kriadis je miaj oreloj, ruĝaj pro honto:

— La reĝo trinkas! La reĝo trinkas! La rrrrrreĝo trinkas!!!

Kaj mi trinkis miajn plorojn.

Kial? Ha! Jen!... Tial ke mi estis juna kaj timema naivegulo ne komprenanta la gajŝercojn, eĉ la plej neofendemajn; tial ke ĉiuj kortuŝaĵoj ekscitis miajn larmajn glandojn. Plorinda nervaro!

Vane, post ĉiu malplenigo de mia glaso, la sinjorinoj de l' afabla societo ĉirkaŭanta min rapidis, kiel estas la kutimo, viŝadi miajn lipojn per buŝtuko. Mi ne povis elporti mian subitan altigon ĝis la trono. Mia reĝeco pezis sur mi. Mi ne scias, kion mi estus doninta por demeti la kronon.

Kruelaj zorgoj, nedisigeblaj de l' potenco! Tio estas l' instruado de l' altranguloj.

He! Cetere, ĉu mi estis dezirinta tiun superegan rangon, tiun fierigan distingecon? Dio povas atesti, ke mi ne deziris ilin.

Kontraŭe, kiel oni diras. Ĉe l' momento kiam la tradicia plata kuko aperis sub la blanka tablotuko, mi, sekrete preĝis la diaĵojn, ke tiun pokalon ili deturnu de mi.

— Faru, O Hazardo! mi ekkriis mallaŭte, ke la fabo ne kuŝu en mia parto de kuko!

Mortigaj ekstremitoj trakuris mian korpon, precipe l' eksteraĵon de mia dorso, je la penso, ke mi eble estos elektata de l' sorto por prezidi la kunvenon.

Mi paliĝis, verdiĝis, ruĝiĝis, pripensante tiun teruran okazantaĵon.

— Ĉiuj okuloj direktos sin al mi, brilaj kaj malicaj, se mi estos la Reĝo! mi pensis.

Terura momento! kaj poste, mi devos elekti reĝinon! ĵeti, belmove, la fabon en la glason de sinjorino, kiu mokos min, ridos, plialtigos la ŝultrojn pro kompato, eble! Timiginda perspektivo! Ho! Dio de l' festenoj! por mi evitu tiujn ĉi suferojn.

Sed la dio de l' festenoj ne bonvolis aŭdi min.

Unue, oni rezervis la parton de l' Bona Dio kaj la parton de l' forestanto. Poste, mia kuzineto elektis, sub la tablotuko, la pecojn da kuko kaj disdonis ilin.

Per febra kaj malvarmega mano, mi prenis la triangulon el peza pasteĉo, kiu estis aljuĝita al mi, kaj mi ĝin palpadis ĉe l' ombro.

Momente, mi ekesperis. Sub miaj fingroj, mi ne trovis fabon. Aliparte mi firme intencis ĵeti ĝin sub la tablon, en «la ekstera mallumo», kiel diras la Biblio, se mi trovis ĝin. Sed unu el miaj apudestantoj, S^{ro} Chamillon, lian nomon mi tie ĉi prezentas al la publika malamego, ekdiris.

— La knabo havas ĝin! Mi ĝin vidas!

Ĉion mi devis konfesi, kaj montri la malbelegan legomon nigran kaj sulkitan. Enea momento de freneza honto. Flama varmo boligis mian sangon, kaj miaj oreloj fariĝis ruĝegaj.

— Nu! elektu vian reĝinon! oni ĉiuloke kriadis al mi. Mian reĝinon! Ha! se mi estus povinta forkuri kaj forlasi tiun ĉi ĉagrenigan privilegion! Tiam, la konscienciproĉoj de l' propra regado montriĝis al mi en sia tuta forto. Kion fari? Mi tre amis mian kuzineton kaj, volonte, mi estus elektinta ŝin por esti mia kunulino. Sed, ĉu tion mi nun devas diri?, mi estis iomete allogata de l' multaj ĉarmoj de nejana sinjorino nomata S^{ino} Grominet.

La riĉeco de la allogaĵoj de ĉi tiu tre agrabla persono, kies vestaĵoj ĉiam dislasis delikatan parfumon de muslino kaj de violo, de longe ravis miajn okulojn, se mi kuraĝas tiel diri.

Mi mortis pro deziro kisi ŝin. Tiel belajn vangojn ŝi havis! Unuvorte, timema kaj romanema, mi tutkore estus verŝinta mian tutan sangon por ŝi, kiel faris ĉiuj amantoj en la libroj, kiujn mi legis. Sed elekti ŝin kiel reĝinon! Ŝin! kaj antaŭ tiel multaj homoj! antaŭ miaj gepatroj! Ho! malfacila tasko! Ho! malfacila tasko!!

— Nu! Nu! decidu; rapidu.

Ĉiuj — la monstroj — ridante petis, ke mi rapidu eldiri publike miajn sekretajn preferojn.

Mi devis obei! mallerte, kaj kun mieno tute malsprita, mi metis la fabon en la glason de la sinjorino havanta plenegan korsajon.

Oni aplaŭdis. De ruĝega mi fariĝis skarлата. Kaj, tial ke ŝi aŭdis, ke oni diras, ke la vero ĉiam eliras el la buŝo de la infanoj, S^{ino} Grominet tre afable ekridetis, kaj tre dolĉan rigardon direktis al mi. Post dudek jaroj, mi povas aldoni, ke tiu ĉi rigardo estis malseka pro feliĉo kaj plena je dankeco.

La reĝino elektita, restis nur, ke mi plenumu postulon — absolute teruran. Multajn fojojn, mi devis signalmontri por trinki.

Mi longe ŝanceliĝis. Fine profitante momentan ĝeneralan konversacion kaj gajan tumulton, mi, kaŝante mian geston, portis mian glason al miaj lipoj. Ho ve! Ĝis la feĉo mi devis malpleniĝi la pokalon de l' altrangaĵoj.

La malaminda S^{ro} Chamillon ekvidis min, kaj per sia plej laŭte voĉo ekkriegis.

— La reĝo trinkas! La reĝo trinkas! La rrrrrreĝo trinkas!!!

Konfuzega, mi malĝuste englutis kaj preskaŭ mortis... La sinjorinoj, kvazaŭ fidelaj servistinoj, faris al mi mil servetojn.

Ili frapis sur mian dorson. Glasojn da malvarma akvo oni trinkiĝis al mi.

Fine, kiam mi rekonsciĝis, mi troviĝis sur la genuoj de mia ridetanta reĝino. Mia varmega kapo kuŝis sur la plej dolĉega kapkuseno, sur ŝiaj dikaj altiraĵoj, kiuj trankvile subleviĝis.

— Ŝin kisos! Ne ŝin kisos!! kriis la ĉeestantoj gvidataj de l' kruelega S^{ro} Chamillon.

Mia reĝino kisis min.

Kaj mi svenis.

Ne! Tio kion ili suferigis al mi, tiun tagon, la solan vesperon ĉe kiu mi estis reĝo!!!

Ho! la monstroj!

Kun la permeso de l' aŭtoro
Trad. JOHANINO FLOURENS.



Kopirajto.

SEN KULEROJ, SEN FORKOJ.



Kopirajto.

MIRINDA MONUMENTO D
Sankta akvujo en la urb

Hind

Verkita de ADINARAYAN

Doni en tiu ĉi revuo priskribojn pri ĉiulandaj kutimoj, arkitekturo, etnografio, literaturo, plibono estis de l' komenco nia celo kaj nia direktanto, sekvita ne flankigante. Hodiaŭ agema propagandisto, duobligita de klerulo... kaj ankaŭ de artplena fotografanto.

Por la pli multo de l' homoj Hindujo estas ne konata regiono; aŭ eĉ se konata, estas nur kiel la lando de la fablaj riĉoj kaj malnobla idolservado. Eble por ne malmulto, la loĝantoj de tiu ĉi antikva lando estas la samaj kiel Ruĝaj Indianoj. Sed eĉ malgranda konado sufiĉas por forpeli tiujn ĉi iluziojn. Tiuj, kiuj venis al nia lando por studi niajn sovaĝajn kutimojn restadis ensorĉitaj de niaj filozofio kaj literaturo. Max Müller, kiu en la komenco rigardis niajn sanktajn librojn — la «Vedojn» — kiel fasko de superstiĉoj kaj babiladoj de infana raso diris, je la fino de lia longa kaj brilega vivo, ke la «Upaniŝad'oj» * estas la konsolo de liaj lastaj tagoj. Schopenhauer ekvidis en la samaj Upaniŝad'oj la sekreton, kiu faras la vivadon komprenebla kaj la morton suferebla. Nia senmorta dramo «Sakuntala» aŭ «la perdita ringo» eliris de Goethe senliman admiron pro la drama lerteco kaj poeta fajro. Inter vivantoj mi nomas nur Pierre Loti, kiu ankaŭ subfalis al la sama ensorĉanta influo.

Sed la ĉarmoj de Hindujo ne estas enfermitaj por la studanto, kiu konsumas la meznoktan oleon inter misteraj volumoj. Eĉ al la supra vidanto — la malvarma vetura vojaĝanto — Hindujo prezentas multe da logaĵoj, ravaj vidaĵoj en siaj neĝkovritaj montegoj kaj en la valoj brilantaj kun tropikaj kreskaĵoj. Tie ĉi Naturo sin vestas matene kaj vespere per gajaj kaj luksaj koloroj kaj ĉie, supre, sube kaj ĉirkaŭe, la freŝaj vidaĵoj kaj novaj sonoj incitas la animon de la rigardanto konfesi la perfektecon de l' Kreinto.

Eĉ la proza afero de la ĉiutaga vivado de l' modernaj urboj ne estas seninteresa al la fremduloj. Niaj temploj, kies ornamitaj turegoj elstaras kontraŭ la brila Hinda



Kopirajto.

TROPIKAJ

(*) Sanktaj verkoj hindaj.



HINDA ARKITEKTURO.
CHI DAMBURAN.

Kl. A. Chettiar.



Kopirajto. NIA KUNLABORANTO.

jujo.

IA CHETTIAR, (Hindujo).

istoj, k. t. p. estus jam bone. Sed uzi Esperanton logike, tiamaniere ke enlanduloj mem priskribu tion, kio rilatas sian landon estas pli bone. Tiu ĉi ni povas enpresu ekvidon pri la mirinda lando, kiu formas unu el la plej belaj juveloj de la Brita krono, kaj tio dank'al unu certa hinda samideano,

ĉielo, kies mirindaj skulptaĵoj estas monumentoj al la pieco kaj la malavareco de la estintaj regnestroj, kaj kies religiaj procesioj altiras amasojn, eĉ en tiuj ĉi materialismaj tagoj; niaj stratoj kie la duonnudaj negocistoj sidas inter iliaj komercaĵoj sub la malkovrita ĉielo, la strangaj kutimoj kaj moroj de l' diversaj sekcioj de l' popolo, eĉ la detaletoj de ilia ĉiutaga vivado, kiel banoj farataj en la riveroj kun ordonitaj religiaj ceremonioj, manĝaĵoj kiuj estas prenataj sen kuleroj, sen forkoj, tiuj ĉi kaj aliaj estas ĉiam interesplenaj por la nekonantoj; dum grandaj konstruaĵoj kiel la fama « Taj Mahal » en Agra ** la tombo konstruita de l' imperiestro Shah Jehan pro l' amo al sia mortinta edzino Nur Jehan (la lumo de l' mondo), kaj la mirinda palaco de l' Hindaj regnoj en Madura *** estas atestantoj daŭrantaj de la altaĵoj, kiuj ni atingis en la bieno de l' belartoj.

Tia estas la lando — mi preskaŭ dirus la kontinento — kiu nun gajnas varbitojn al nia kaŭzo. Vivu Esperanto kaj regajnu nia lando sian antikvaŭ grandecon.

Speciale verkita kaj ilustrita de T. ADINARARAYANA CHETTIAR, Hindujo.

Ni komencos en nia proksima numero serion el artikoloj de S^o Simper pri la vivado de angla teoplantisto en Hindujo, kiuj formas interesan kontraston kun la supra priskribo pri Hindujo vidita de Hindujo.

« T. L. M. »



KRESKAĴOJ

(**) Urbo en Nord-Hindujo. — (***) Urbo en Sud-Hindujo.

La insulo de l' poeto.

Laŭ Frantz FUNCK-BRENTANO (Francujo).

La lastan oktobran monaton mortis JOSÉ MARIA DE HEREDIA, glora poeto, kiun Lemaitre (1) nomis « la princo de la sonetistoj ». Li nur lasis al ni unuvoluman verkon: *Les Trophées* sed ĝi estas admirinda juvelaro. La poezioj de HEREDIA estas briaj, elektitaj, sendifektaj: per tio li multe similas al la hispana versofaristo Garciaso de la Vega. Naskiĝinta en Santiago (Kubinsulo), li mortis sesdek trijara kaj lasas al posteularo merititan glorfamon Lia filino, kies romanoj estas subskribataj per GERARD d'HAUVILLE, estas aŭtorino tre ŝatata de la franca publiko.

VICENTE INGLADA, Valencia.

• Vizito farita en la insulon Kuba de S^o FUNCK BRENTANO, talenta franca literaturisto, inspiris al li la ĉarman jenan rakonton, tradukitan por niaj legantoj de S^o BACQUET.

La insulo « brilega kaj malproksima » pri kiu JOSE-MARIA DE HEREDIA tiel taŭge parolis en sia parolado de akcepto en Akademion, al tiu kiu trairas ĝin, ŝajnas esti nature produktinta la verkaron de l' poeto, kiel ankaŭ ĝi produktas la grandioztrunkan *Cejba'on* kaj la reĝan palmarbon. En Havano la sonetoj de S^o de Heredia ŝajne promenas sur la strato!

Kaj kiom oni fieriĝas pro li. Mi revenis el Matanzas kaj mi staris en la posta parto de la vagonaro, sur la plataĵo malfermita, en la libera aero, rigardante la varmkoloran kamparon malvolviĝantan, la ruĝterajn kampojn, iel flavruĝajn, bronzuĝajn, kies koloron malfacile povas imagi eŭropanaj okuloj; la plantaĵojn de sukerkanoj, kies longaj kaj delikataj folioj balanciĝis je la venteto, la kajutojn de la plugistoj, nomitajn *bohio* de la enlandulo, ombrigatajn de altaj kokosujoj, tegitajn per palmofolioj. Je la sojlo de la pordo, ruliĝis nigruletoj tute nudaj; okule mi sekvis la makulojn helajn, tiel helajn kaj brilajn, kaj tiel ĝuste akordiĝantajn je la tonoj de l' pejzaĝo, kiujn faris la flirtantaj ŝtofoj per kiuj la negriroj sin ornamas, aŭ, en la hela ĉielo, la flugadon kvietan de l' « arau », kies flugiloj senmovaj estas ŝvelataj de la vento, kiam alproksimiĝis malgranda viro dikkorpa, kun vizaĝo bruna, okuloj nigraj, lipnaroj nigraj kaj hoke kurbiĝantaj.


— Vi estas Franco?
— Kiel tion vi scias?
— Laŭ via maniero loki la nazumon.
— Ha!
La malgranda brunvizaĝulo parolis preskaŭ ne kompreneblan francan lingvon.
— Ĉu vi konas S^{on} de Heredia?
— Kiel? Ĉu mi konas lin? Ĉar li estas mia *boss* (mastro), kiel diras la Amerikanoj.
Kaj tuj la malgranda hoklipharulo, ne avertinte, ekdeklamas *Samourci'on*:
... C'est lui, sabre au flanc, l'éventail haut. Il va,
La cordelière rouge et le gland écarlate
Coupant l'armure sombre, et sur l'épaule éclate
Le blason de Hizen et de Togungawa.
La malgranda nigrali-pharulo deklamis tiujn versojn kun

stranga tono kiu sonoris kiel kupro. Tuj fininta, li diris al mi: kaj vidu kiel ĝuste la vortoj estas aranĝitaj! Ekzemple, tiu-ci vorto *ecarlate*, kiel ĝi brilas en tiu loko! Ĉu vi ne trovas tion eksterordinara?

José-Maria de Heredia naskiĝis en Santiago de Kuba, en parto de l' insulo, kie restas ankoraŭ vivaj la francaj tradicioj, kie nia lingvo estas parolata ankoraŭ hodiaŭ en kelkaj malnovaj francaj familioj, elmigrintaj el Sankta Domingo, dum la negraj ribeletoj. Tie la poeto naskiĝis en *Kafetal'o* (plantejo de kafo), sur la altaĵoj, proksime de l'urbo. Lia familio estas nobela kaj antikva; ilustrita, en la epopea tempo, de Petro de Heredia, kiu fondis Kartagen'on de Hindujo. Li estas la fama praavo pri kiu laido povis skribi:

La gloire a sillonné de ses
[illustres rides
Le visage hardi de ce
[grand cavalier
Qui porte sur son front
[que nul n'a fait plier
Le hâle de la guerre et
[des soleils torrides.

La Kubanoj ne fieriĝas nur pro nia Heredia, sed pro la sia; ĉar S^{ro} de Heredia havas kuzon samnoman kaj sambaptoman, kiu estas la plej granda poeto del Ameriko Hispana; plie li havas nevon, Emilio de Heredia, kiu estas brilkolorama pentristo; kaj jen estas la filino de la poeto, delikata



Fot. E. Piron,

JOSÉ MARIA DE HEREDIA
Mortinta la 2an de oktobro 1905.

Kl. « Annales »

kaj ĉarma verkistino. Kia fasko!

Alia fakto klarigas, pli bone ankoraŭ ol la koloro de la landoj, la blindigajn gemojn — preskaŭ tiel oni devas paroli pri la verkisto de « Trofeoj », per kiuj la poeto pli riĉiĝis la Francan literaturon, — nome la franca genio, kiu iel penetras la tutan insulon Kuba. Tiel, de la nordo al la Sudo de Ameriko, troviĝas postsignoj de l'agado de la famaj Francoj de la deksepa centjaro. Ĉe l'universitato de Havano, kie, en la instruado de l' antropologio, nia klera samlandulo, S^o D^{ro} Montané okupas ĉefan rangon, la verkistoj kies lernado formas la ideojn de la junularo estas francaj verkistoj, ĉu pri la filozofio, ĉu pri la historio, ĉu pri la legoscienco aŭ la medicinarto; en la Biblioteko nacia de Havano, tri kvaronoj de la libroj estas francaj libroj; la germanaj kaj anglaj verkistoj, Goethe kaj Herbert Spencer, alvenas en Kuba'n nur france tradukitaj.

Trairu la plej vizitatan straton en Havano, la *calle Obispo* (strato de l'Episkopo), sub suno brilega, kun la kovrilegoj

(1) Franca literatura kritikisto.

sternitaj tra la strato, de domo al domo, la vidaĵo estas ad-
orinde pentrinda; legu la elpendaĵojn de la magazenoj, la
subskribaĵojn de la montraj fenestroj, ĉu de restoracioj aŭ
kafejoj, ĉu de librejoj aŭ magazenoj de novaĵoj, ĉu de vend-
istoj de mebloj aŭ *bloj*, vi ne eliras plu el Francujo: « Restora-
cio Pariza; — Al granda Parizo; — al malgranda Parizo; —
fadenejo Pariza; — Al *Louvre*; — Al la *Malkareco*; — Al *Palaco*
Reĝa; — (ni estas en Havano!) — al *Petit-Trianon*.» Likvor-
vendejo estas nomita « Francujo »; alia, flanke, « Rusujo »; la
Franca-Rusa interligo en insulo Kuba! Mi portas sur la kapo
ĉapelon fabrikitan en Panama, kaj aĉetitan en Havano; sur la
internaĵo de la ĉapelo oni legas: lasta novaĵo, Parizo!

Mi vizitis la lernejojn de Havano gvidata de S^{ro} Ezekiel
García, profesoro ĉe l'Universitato, rimarkinda amiko de
Francujo. La lernejestro persistis prezenti al mi ekzercadojn
marŝajn kaj gimnastikajn, kiujn trideko da knabetoj, nigraj
kaj blankaj intermiksitaĵoj, elfaris kun ĉarma precizeco. Li
eksidigis je la fortepiano por akompani, per ĝojiga ritmo, la

movadojn de la bandeto. Resonis la unuaj akordoj:

— *La maison Boulanger'an!* diris al mi la lernejestro, trium-
favoĉe. « Revenante de la Parado » ... ankoraŭ; kaj tiel mal-
proksime! Tamen, kiom dolĉa estas por la orelo kio ajn fran-
ce sonanta, kiam oni estas malproksime de Francujo!

El « *Les Annales Politiques et Littéraires* ».

Esperantigis E. BACQUET.

*Al la lertega artisto, S^o Eug. Pirou, 23, Strato Royale en Pa-
rizo, la fotografisto de ĉiuj la grandaj gloruloj politikaj kaj
literaturaj, ni ŝuldas la belan portreton de José Maria de
Heredia, kiu ni enpresis apude. Vizito de la kolekto el portretoj
de S^o Pirou estas pleje interesa, kaj ni ne tro sciis ĝin kon-
sili al niaj legantoj loĝantaj en Parizo aŭ pasigantaj kelkajn
tagojn en la ĉefurbo de Francujo. La plej afablan akcepton ili
estis certaj ricevi.*



Pentrarto.

Antaŭ kelkaj monatoj la franca suke-
ristaro vekigis miregata ekscianta ke S^o
Cronier, unu el la plej famaj kaj estima-
taj homoj en la industria mondo estas
ĵus memmortiginta.

Oni ne sciis kion pensi pri tiu okazint-
aĵo Sed baldaŭ la kaŭzo ne plu estis
duba. La granda financisto estis serĉin-
ta en la morton rimedon kontraŭ senho-
noriga kondamno. Efektive mortante, li
lasis ŝuldon el pli ol cent milionoj!

En la unuaj tagoj de decembro, oni
vendis la artajn ĉefverkojn guste elekti-
tajn, ... kaj pagitajn per la mono de aliulo.
Jen estas kelkaj detaloj pri tiu sensacia
vendo, antaŭokazita de ekspozicio pri-
vata, kiun vizitis pli ol 20,000 personoj.

« Estis ja belegaj pecoj, precipe je pen-
traĵoj modernaj kaj de l' XVIII^a centjaro.

La franca skolo de 1830 estis repre-
zentata de Corot, Dupré, Diaz, Rousseau,
Decamps kaj Troyon; la XVIII^a centjaro
de Chardin, La Tour, Watteau, Frago-
nard, Personeau; la angla skolo de
Gainsborough, Lawrence, Romney, Rey-
nolds.

Pentraĵo de Chardin atingis 140,000 fr.
alia 50,000; iu de Fragonard 42,000 fr.
alia 182,000, alia 420,000 (mi diras 420,000!)
unu Nattier 65,000; unu Watteau 152,000.
Unu krajondeseĝno de Fragonard 35,500;
unu paŝtelo de La Tour 77,000, alia — lia
portreto — 70,000; de l' sama, virina por-
treto 72,000 kaj vira 36,000.

Inter la modernaj, du Corot, unu
47,000, la alia 31,000; de Daumier, pen-
traĵo 17,000; unu Delacroix 17,000; pej-
zaĝoj de Diaz 50,000, 45,000, 35,000; de
Jules Dupré. 60,000 kaj 34,000; de Th.
Rousseau 110,500 kaj de Troyon 40,000.
La du sidoj de vendado estis pasiaj. La
vendo de tapetaĵoj kaj salonaj mebloj
donis la sekvantajn ciferojn: salonme-
bloj, Beauvais kaj Aubusson, 205,000,
141,000, 82,000, 57,000 fr.; kaj tapetaĵoj:
Historio de Psyché, la ŭ Boucher, 300,000,
81,000, 105,000 fr.; la historio de Don Ki-
hoto, tri pecoj, 200,000; la itala komedio,
308,000!

EUG. MONTROSIER.



Teatro — En Béziers.

La teatraĵo ludota la 26^{an} kaj 28^{an} de
aŭgusto 1906^a ĉe niaj arenoj estas defi-
nitive elektita; ĝi estas « La Vesta' ulino »
triakta lirica tragedio de S^{ro} de Jouy,
muziko de S^{ro} Spontini. La 15^{an} de
decembro 1807^a, ĝi estis ludata, unufoje,
ĉe la Imperia Akademio Muzika.

La historia fakto el kiu estas ĉerpita
tiu ĉi teatraĵo devenas de la 26^a jaro de
Romo. Jen estas ĝi.

« La Vesta' ulino Gorgia plej freneze
amas Licinius'on, kaj enkondukas lin en
la templon de Vesta, ian nokton, kiam ŝi
gardis la sanktan fajron; sed, ho ve! tiu
ĉi sekreto estas eldirita. Gorgia suferas
do la teruran morton truditajn de l' leĝo,
kies severegecon altiris ŝia pasio: ŝi
enteriĝas viva. Licinius mortigas sin
por eviti la turmenton per kiu la necedi-
gebla leĝo punas lian krimon. »

La historia vero postulis la morton de
l' kulpa Vesta' ulino; sed l'aŭtoro forigis
tian finiĝon; li mirakle savas ŝin kaj
edzinigas ŝin je ŝia amanto.

La Beziersa Meceno, S^{ro} de Beaux-
hortes, volas pligrandigi nian artistan
stelon, jam tiel brilantan kaj faman; tial, li
pliriĉigos Béziers'on per nova verko.

La 2^{an} de septembro 1906^a okazos
popola teatraĵo konsistanta el la balet-
o de Ascanio, el la simfonio en C mol de
S^t Saëns, kun granda orkestro kaj or-
geno. Orgeno ĉe la Arenoj estos io neko-
muna kaj superos ĉion ĝisnunan viditan.
Krom tio, granda surprizo — vera novaĵo
— estas ankaŭ rezervata por la Bezier-
sanoj; sed ni ne devas antaŭparoli pri
tio ĉi; ni nur diru, ke oni aŭdos la
nekompareblan violoniston S^{ron} Wolff.
Tiu ĉi grandfama koncertisto estas vera
virtuozo de l' arĉo, kies kutima prezo
estas 1200^{fr} ĉiuprezentade.

JOHANINO FLOURENS.

Kantado — Gabriel Krauss.

Ĵus mortis la mondfama kantistino
Gabriel Krauss. Naskiĝinta en Vieno, ŝi
havis en tiu ĉi urbo siajn unuajn sukces-
ojn ĉe la Imperia Opera kaj la Itala
Teatro. Post ĉeestado en Italujo ŝi
loĝadis en Parizo, kie ŝi iĝis dum longaj
jaroj la plej ŝatata kaj amata lira tra-
gediistino. De la jaro 1888^a ŝi estis tute
dediĉinta sin al la instruado de sia arto.

Fotografio.

Okazos en Parizo dum la dua parto de
1906, granda Ekspozicio de l' *Fotografio*
kaj de l' *Sciencoj, Artoj kaj Industrioj*
ĝin rilatantaj. Tiu grandega universala
elmontro havos grandan intereson ĉar,
de la jaro 1892^a, dum kiu okazis la unua
tiuspeca ekspozicio, estas elpensitaj la
fotografio kun koloroj, la kinematogra-
fio, la ilustritaj poŝtkartoj kaj multaj
aliaj specialaĵoj, kiuj jam ne havis in-
ternacian ekspozicion.

Por ni, Esperantistoj, kiuj tiel uzas
ilustritajn poŝtkartojn, aŭ interŝanĝas
fotografiaĵojn, la ekspozicio estas aparte
atentinda. Inter ni estas fotografantoj
tute lertaj; ili certe estos feliĉaj esti
sciigataj pri tiu fotografa okazo kaj ni
ne mankos ĝin fari.

Oni povas, de nun, sin turni al la ĝe-
nerala sekretario, S^o L. Gastine (Grand
Palais des Beaux-Arts à Paris, porte B).

« Les Annales politiques et littéraires. »

Tiu interesa literatura revuo modern-
iĝis kaj plibeligis. De la unua numero
de l' 1906^a jaro, ĝi entenas ilustritan al-
donon okpaĝan, kiu enhavas krom la
muziko kaj la gravuraĵoj, artikolojn
nunajn kaj artajn, kaj ilustritan internan
kaj eksteran ĝeneralan kronikon.

La revuo konservas sian karakteron
esence literaturan; kaj estos presataj,
inter aliaj, la jenaj ĉefaj verkoj:

Memoroj kaj Rakontoj, de l' fama Pro-
venca poeto, *Frédéric Mistral*;

La edziĝo d'Agneso, de l' franca aka-
demiano *Jules Claretie*;

Promenadoj en la Muzeo de l' Louvre, de
Jules Breton, de l' Instituto;

**Konsiloj al la Junaj Francoj kiuj deziras
koloniigi**, de *generalo Gallieni*;

Studoj pri la klasika teatro, de *Mounet*
Sully, la mondkonata aktoro de la franca
komedio, k. t. p.

Al niaj legantoj amikoj de la franca
lingvo ni tre rekomendas « Les Annales
politiques et littéraires » kiuj dum la tuta
pasinta jaro subtenis efike nian aferon.





DIVERSAĴOJ



Algeriaj Skizoj.

L' Oazo.

Kiu ne vojaĝis tra arabaj landoj sudaj ne povas kompreni la ĉarmon de oazo. Post longa rajdado aŭ



LA OAZO APUD « EL KANTARA ». *Kl. Layer.*

veturado en senkomfortaj publikaj omnibusoj, tra senarabaj ebenajoj, oni sentas ĉiam veran ĝojon kaj ankaŭ honestadon enirante en Oazon.

Sed la vidaĵo ne estas sama en ĉiuj oazoj, kaj la malsimileco devenas de la maniero laŭ kiu la akvo estas kondukata ĝis la palmoj.

Oni scias, ke la palmo postulas sufiĉegan surverŝadon. Araboj diras, ke ĝi bezonas vivi kun « La kapo en la fajro kaj la piedoj en la akvo ».

Iafoje la akvo alvenas de l' najbaraj montoj per torentoj fluantaj videble; barajoj ĝin flankenigas kaj kondukas per kanaloj nomitaj « Segia »oj ĝis en la ĝardenojn apartigitajn per muroj el tero aŭ rilitaj ŝtonoj. Tio estas la okazo de l' oazoj de « Ziban » (1) kaj, ĝenerale, de l' saharaj regionoj. La akvo estas ĉiam dividata kaj mezurata kiel eble plej zorge. Iafoje malpacetoj kaj eĉ militetoj okazas pro tiuj partigoj. Kvazaŭna sindikato reguligas la surverŝajn tagojn kaj la akvokvantojn disdonotajn al bordanoj.

La laboro konsistas nur konduki la akvon en tiun aŭ alian kanalon aŭ, kontraŭe, ŝtopi per tero aŭ breto ĝiajn enirejojn.

En tiaj oazoj, la animeco estas negranda. Kvieteco estas rompata nur matene aŭ vespere kiam la brutaroj trairas la stratetojn, irante serĉi ian malgrasan paŝtistejon eksteren.

Tute malsimilaj estas la oazoj de « Mzab » (2). Tie la akvo kuŝas subtere kaj, per multaj putoj, oni devas elĉerpi ĝin el la internaĵo de l' tero.

Por suprenigi la akvon oni uzas specialan akvujojn el kaprovira felo, havantan pipiformon.

Ŝnuroj, alligitaj al la forno kaj al la ekstremaĵo de l' tubo pasas, la unua sur rulbloko la dua sur rulaĵo lokita sube la rulbloko, kaj estas tirataj ĉu de azeno, ĉu de kamelo. Kelkfoje la puto estas provizita per du akvujoj kaj, ne malofte, oni povas vidi jungitajn, unu apud la alia, azenon kaj kamelon, aŭ eĉ beston kaj viron aŭ virinon.

Tiam kiam la akvujo troviĝas sub la malsupera rulaĵo, la piptubo estas vertikala kaj la faldo farita ĉe ĝia komenco malebligas akvon flui el la forno de l' pipo.

Sed kiam la ekstremaĵo de l' piptubo alvenas samalte kiel la rulaĵo, la tubo direktiĝas samdirekte kiel la malsupera ŝnuro, t. e. preskaŭ horizontale, kaj la akvo elversigiĝas el la pipo en pelvon, de kiu ĝi estas kondukata per defluloj en la ĝardenon.

Ĉia ĝardeno havas sian puton, kelkfoje du, kaj la senĉesa alterna irado de l' bestoj, de l' puto ĝis la fino de l' irejo kaj reciproke, donas al la Mzab'aj oazoj animecon tute karakterizan, samtempe kiam la



ĜENERALA VIDAĴO DE OAZO. *Kl. Layer.*

grinco de l' rulblokoj faras pitoreskan bruon nomitan « La krio de l' Mzab'o ».


BLEDAMANTO.

(1) Regiono en la sudo de l' Konstantina departemento.

(2) Regiono tre speciala kaj interesa sidanta sude de Laghouat'o (elp. Laĥouat'o).

Modoj de l' pasinta tempo — La « Krinolino »

Verkita de JOHANINO FLOURENS (Francujo).



Antaŭ nelonge li mortis; ĉu vi bedaŭros lin, fratinoj miaj? Ho! Ne ekeligu viajn naztukojn el viaj poŝoj, kaj ne estu korpremegataj demandante min: « Kiu, kiu? Neniu el niaj karaj samideanoj? » Ne, rekuraĝigu. Almenaŭ, se li estus partopreninta en l'esperantista armeo, ni certe sentus iom da ĉagreno malgraŭ lia abomeninda elpenso. Sed, ŝt! ŝt! mi respektu la cindrojn de l' estinta S^{ro} Aŭgusto Person, al kiu ni ŝuldas la krinolinion.

Mi malbenas ĝin — mi estas kompatema: mi malbenas l' elpensitajon kaj ne l' elpensinton pli ol unu fojo, kiam mia kudistrino ridetante diras: « Mi tre kredas, ke la venontan sezonon la krinolino reaperos. » La timo de tia okazontaĵo senmovigas min, ŝtonigas min, por tiel diri. Kion mi farus, dioj grandaj? Mi neniam konsentus fariĝi dika sonorilo aŭ, se vi preferos, kaĝo por kokidoj. Mi jam vidas min sur la stratoj renkontantan jen bubon, kiu mokridetante sublevas sian ĉapeton, kaj alparolas min: « Kiom kostas la kokidoj enhavataj en via kaĝo, fraŭlino? » jen petolema knabo, kiu ekvidante min ekkrias: « Ho! Ho! kaj de kiam la sonoriloj promenas tute solaj? Admiradu do tiun vere belmovan balancadon! » Kaj se hazarde mi havas banton malantaŭ mia ĉapelo, aŭ, ĉe mia talio, zonon nomatan « Sekvu min, junulo », li ekridegas: « Ho la la! Kia eleganteco! Rigardu do kaj metu blankajn gantojn: ni havas rubandojn anstataŭ ŝnuron por sonorigi nin ».

Brrrr!!! Ektremeto trakuras mian tutan korpon, kaj la vian ankaŭ, ĉu ne vere, afablaj samideaninoj? Ho! Ni alvoku la Dion de l' koketulinioj, kaj hore ni preĝu: « Dio bona, neniam, neniam revivigu la krinolinion. Pro la ĉielo, ĝi ne postvivu sian elpensinton.

Tamen, por diri la veron, S^{ro} Person nur perfektigis (hm! hm!) tiun eron de l' virina kostumo; ĉar en la XVIII^a centjaro, niaj

praavinoj jam ornamis siajn jupejn per « korboj », kaj antaŭ li, diversaj krinolinoj estis viditaj, eĉ en Anglujo, kien reĝino Victoria enkondukis ĝin. L'arto (!) de S^{ro} Person kreis la malbelegan subjupe kun ringejoj. Li ricevis patenton (merititan! vere), kaj vendis sian elpenson 4000 frankojn. Jes, fratinoj, 4000 fr. por tiu abomenindaĵo.

JOHANINO FLOURENS.



La Devo.

Kio estas la devo? Al kiu oni povas pli taŭge fari tiun demandon ol al virinoj. Ĉu ili ne havas la sanktan mision formi karakterojn, knedante cerbojn de siaj karaj idoj, helpante ankaŭ, se estas necese, sian edzon ne flankiĝi el la rekta vojo, iafoje malfacila, de la vivado.

Pri tiu demando kaj pri la sekvantaj, ni petas respondojn de niaj legantinoj, kaj ankaŭ de niaj legantoj; kaj unu tre fervora kaj tre lerta samideanino, Sinjorino Johanino Paris, kolektos plezure tiujn, kiujn oni bonvolos sendi al ŝi.

Ni donos analizon de ili kaj ni enpresos la plej interesajn.

Kio estas la devo?


Ĉu vi konas faman difnon pri ĝi?

Kie ĝi komencas kaj kie ĝi finas?

Ĝis kia limo oni estas devigata ĝin plenumi?

La volo de ĝin plenumi cedinta pro neevitebla kaj supera forto, kia estas la grado de l' suferonta respondec.

Oni sendu la respondojn al Sinjorino J. Paris, Château des Hommeaux, par Le Lion d'Angers, (Maine et Loire), France.



Originala Novelo

De FRAŬLINO OXENFORD, el Brighton (1).

Alvenis la printempo. Ĉiam ŝi iris renkonte al Harry kiam li forlasis sian laboron. La tagoj plilongigis, same ankaŭ la promenado hejmen; kaj la paŝoj malpirapidigis! La arboj burĝonas, la birdoj edziĝas, la kukolo alvokas; kaj estis ĝojo elserĉi la sekretajn vojetojn tra la arbaro. La rozoj revenis sur la vangoj de Judith, kaj ŝi sentis ke malgraŭ ĉio, la mondo estas belega kaj plena je feliĉeco.

Sed Harry estis ŝanĝiginta. La Civilizacio estis alveninta en la vilaĝon Kelkaj el la servistoj de lia Moŝto iris Londonon, kaj revenis kun novaj ideoj. Harry estas belulo, la junulinoj estas kuraĝaj, sed jam li ne atentis ilin; tial ili koleretas, kaj ridas kaj parolas pri Judith, «la sorĉistino». La viroj mallaŭte diras en lian oreilon, ke li estas malsaĝulo, kaj demandas ĉu li havas okulojn. Li lernas liajn lecionojn, kaj ŝi — ŝi eltrovis, kiam estis tro malfrue, tion, kion la viroj nomas la «amo»! kaj kiel vera, nobla, daŭranta ĝi estas ĉe ili!

Forpelite el la vilaĝo, ŝi iris al la arbaro, al la malriĉa loĝejo de la maljuna arbohakisto, kiu ricevis ŝin, kaj kiu flegis ŝin kun la amemeco de virino, kiam ŝi estis atakita de l' febro... Ŝia infano naskiĝis kaj mortis; kaj fine ŝia unu amiko, la maljunulo ankaŭ mortis; li mortis dum li malbenis la filon, kiu forlasis lin en sia maljuneco. Sed li benis la malfeliĉan virinon, kiu zorgis pri li dum liaj lastaj horoj, kaj tiu beno estas la unua hela punkto en ŝia vivo.

De tiu tempo, ŝi estis vivinta sola en la sama loko. Ĉar ŝi povis vivi! Tio plue pruvis ŝian sorĉarton je la malsciantoj kaj antaŭjugemuloj; kaj, kiam ŝi iris vilaĝon por vendi la korbojn, kiujn ŝi lernis fari, oni ilin aĉetis de ŝi, ĉar oni timis, ke ŝi faros malbonaĵojn al kiu rifuzos ŝiajn proponojn. Kelkafoje

oni donis al ŝi pecon da pano, aŭ malmulte da lakto, sed tre malofte.

Harry kompreneble edziĝis. Bone ŝi memoras la tagon de la edziĝo. Pro tiu sinturmentemo, kiun ŝajne la virinoj tiel multe ŝatas, ŝi iris la vilaĝon matene, kaj sin kaŝis post tombkonstruaĵon en la preĝejkorto, konfidante ke la vilaĝanoj estos tro interesataj de la edziĝo por ŝin vidi. Sed ŝia malbona sorto postsekvis ŝin, kaj ŝi estis eltirata de ŝia kaŝejo. Ili mokadis ŝin, kaj laŭ diabla krueleco, ŝin tenis ĝis kiam la novaj geedzoj eliris el la preĝpordego.

«Jen la sorĉistino, Harry, kion ni faros? Ĉu ni subakvigos ŝin? — Ha, ĉu ŝi deziris malbeni la edziĝon? — Gardu vin, Harry! vidu kiel ŝiaj okuloj brilas». Tiel kriis la amaso el maldolĉaj, mokaj malsimpatuloj!

Kvankam Harry, pro la malverdiroj de la malamiko de Judith, forte estis konvinkita ke ŝi ensorĉis lin, li tamen ne povis rigardi vizaĝe la virinon, kiun li forlasis je ŝia bezona horo; li do turnis la kapon dirante «Lasu ŝin, amikoj, ŝia propra kulpa konscienco sufiĉe ŝin punos. Dank' al Dio, mi liberigis de ŝia sorĉarto».

La nova edzino sin turnis kaj triumfe rigardis sian antaŭan konkurantinon, kiu, reliberigita, staras konfuzita kaj vundita — sed ankoraŭ maltimigita — inter la vilaĝanoj amase kriegantaj.

Tiam, forkurinte, Judith revenis al sia mizera hejmo, kaj tie restadis.

Nu, la edz vivo ne estis feliĉa. La beleta Martha estas akralangulino, kaj la vivo de Harry estas preskaŭ tiel mizera kiel tio de Judith. Li sopiregas

(1) Sekvo. — Vidu la 6an kajeron (Decembran).

al la kvieteco. Iliaj infanoj mortis, krom unu, kiun li pasie amas. Kiu diros, ke li ne pensas kelkafoje, bedaŭre, al la amema virino al kiu — eĉ nun — oni ne povas igi diri eĉ unu vorton kontraŭ li.

Ha! kiel tiuj ĉi scenoj pasas kaj repasas antaŭ la spiritokuloj de Judith, dum ŝi rigardadas en la flamojn de la fajro. Ĝi malheliĝas, kaj ŝi levigas por surjeti branĉaĵojn. Dum ŝi tion faras, ŝi eksentas la ventegon kaj fulmotondron, kiujn ĝis nun ŝi nek rimarkis nek prizorgis. Ĉielo! kia ventego! Neniam ŝi aŭdis tiel furiozan fulmotondron! La vento kaj la tondro intermiksiĝas, kriegas, blekegas, siblegas kvazaŭ en kontraŭstaro, aŭ konkuro; ili dise elradikiĝas la arbojn dekstren kaj maldekstren, en sia frenezo. Ŝi residiĝas apud la fajron, kiu, ventumata de la ekstera vento, helege brulas, ĵetante brilantan lumon al ŝia maldika, kvankam fortsana formo, al ŝia ankoraŭ bela kaj sentema vizaĝo.

Ree ŝiaj pensoj reiras al la pasintaj tagoj. Ĉiam ŝi vivis senmakule kaj rekte; kial do ŝi tiel suferis. Pli kaj pli la frenezeco de la nokto eniras ŝian spiriton, kaj plue, vundo ĉe la kapo doloregas ŝin kaŭzante strangajn revaĵojn. Ŝajnas al ŝia ekscitita imago, ke la vento respondas al ŝiaj pensoj. Ĝi ŝajnas ridegi kaj moki ŝin. Ŝajne ĝi diras «Vi estas ja pli bone dank' al via boneco, via honesteco! Kial vi estis tiel malsaĝulino? Kial vi ne kaŝis vian pekon kiel aliaj kaŝas la sian? Ĉar vi estis la malamagata konkurantino de la riĉa Martha, tio kaŭzis ke vi estas forpelita. Ha-ha-ha, malsaĝulino! Ha-ha-ha!...

— «Kion mi estus kaŝinta, tio ne estis peko; mi amis lin, kaj li amis min; li estus edziĝinta kun mi se...». Ree la vento ridis «Vi amis! — sorĉistino — Ha-ha-ha!»!

«Jes», laŭte ŝi kriis nun, en la agonio de siaj pensoj, «Jes, mi amis lin, mi amis lin, kiel mi ankoraŭ lin amas. Ho jes, ridu, ridegu! Mi ja scias, ke mi estas malsaĝulino, sed mi ne povas jam alie fari». La fulmo ekbrilegas, la tondro bruegas, la vento eĉ pli laŭte ridegas; la tuta Naturo skuas sin ridante ĉe tia amo. Dum nemultaj minutoj ŝi estas kvietita, sed subite, kriego venas de ŝi, kaj ĵetante sin genue, ŝi levas la brakojn en freneza petego.

«Dio, Dio, kiun la popolo adoras, kaj je kies nomo tiel strange ĝi agas, se vi estas Dio, ne ŝtono, estu malpli severa por mi ol viaj servistoj kaj mortigu min. Se mi pekis, mi ne povos suferi en la infero pli ol mi suferis sur la tero. Kompatu, kompatu! Mortigu min».

Konsumite de sia pasia eksciteco, ŝi falis teren, kaj la vento, kiu saĝne kvietigis dum momento, por ke ŝia krio trafu la ĉielon, rekomencas, duoble furioza.


Subite ŝi relevas la kapon ŝia akra aŭdado distingis homan krion en la bruado de la ventokaj pluvego. Ŝi sin levas, malfermas la pordon, kaj elrigardas. Ree ŝi aŭdas la krion — pli proksime, — la krion de infano! Ŝi alvokas, kaj respondo aŭdiĝas; sed la voĉo malpli laŭtigis. Ŝia duonsovaĝa vivado en la arbaro estas pligrandiginta la akrecon de ŝia povo vidi kaj aŭdi; do sinjetinte en la mallumon, en kiu nur la okuloj de kato povus ion distingi, baldaŭ ŝi revenas portanta la senkonscian formon de infano.

Baldaŭ ŝiaj zorgoj, kaj la varmo de la fajro, efektive ĝin rekonsciigas, sed kiam li malfermas la okulojn kaj vidas Judith, li eksaltas timigita kaj kuras al la pordo, kriante «La sorĉistino, la sorĉistino!» sed kiam li malfermas la pordon, la fulmo preskaŭ blindigas lin, kaj tie li staras, ne sciante kion fari, inter sia teruro de la virino, kaj la timo de la fulmo.

Ĉe liaj vortoj, ŝia vizaĝo malmoliĝis, kaj ŝi maldolĉe ridas.

Daŭranta.

*Originale verkita k. ilustrita de
C. W. OXENFORD.
(Anglujo).*



MIKSALJOJ.

Por la Propagando.

LA KANDELFISJOJ.

Sur la sud'bord'o'j de la du'on'insul'o « Alaska » (nord'a Amerik'o), oni fiŝ'kapt'as mult'e; mal'grand'a'j'n fiŝ'o'j'n, long'a'j'n je 25 centimetr'o'j', proksim'um'e. La korp'o de tiuj fiŝ'o'j est'as tre gras'a, tra'vid'eb'l'a', kaj tiu gras'o, kiu simil'as pork'a gras'o, est'as sen'odor'a.

La land'an'o'j sek'ig'as ili'n kaj de ili uz'as kandel'manier'e tuj kiam ili est'as sek'a'j; de tio de'ven'as la nom'on: kandel'fiŝ'o (cand fish). Tiu lum'ig'il'o strang'a — strang'a almenaŭ por ni, Eŭrop'an'o'j — brul'as dum 15 minut'o'j, almenaŭ, don'ant'e lum'o'n, kiu'n vent'o, eĉ tre blov'a, ne pov'as esting'i.

el Almanach Astrologique

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzajoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet, 59 cours Victor Hugo Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « Miksajoj. »

2^e Krom esceptoj speciale dirotaj, la solvoj devas esti sendataj al Sro Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^e Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombroj de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4^e Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

SOLVOJ DE L' PROBLEMOJ.

Unua problemoj (Rebuso) :

La signifoj de l' figuretoj estas :

TRAfo — LAMpo — ONDO — ESTingo — OSToj — BALailo — DAŬro — FAdeno — MAno — ENirejo — ESPERANT-ISTUJO. Elektante konvenajn silabojn, oni ricevas la sencon de l' rebuso « Tra la Mondo estos baldaŭ fama en Esperant-istujo ».

Dua problemoj :

F L A R I
L A U T E
Ŝ I R M A
L I N I O

Por tiuj du problemoj, mi nur ricevis 2 solvojn ĝustajn. Post lotmontrado, Fraŭlino Dumézil gajnis la unuan premion kaj sinjoro Philippet la duan.

Tiuj du personoj bonvolu skribi al mi por diri kion mi de vas fari de la gajnajoj.

Tria problemoj :

Pirvino, bierO, ĉaMpano, VIno, ĜIno, braNdo laktO.
POMVINO.

Kvara problemoj :

1 6 9 7 3
5 8 4 0 3 kaj aliaj
2 4 6 2 4 multaj solvoj
1 0 0 0 0

Kvina problemoj :

kuro + R = kruro
kulo + O = okulo
kanalo + K = kalkano
pino + S = spino
loko + U = okulo

K O K S O — K U R S O

Sesa problemoj :

Oni devos serĉi kaj ne ŝerci por trovi la solvon. Malgraŭ la malfacileco lertaj serĉemuloj trovos.

Sepa problemoj :

Por trovi la glitanton, turnu renversante la gravuraĵon. La kapo de la glitantino kuŝas kontraŭ la kruro de la ĉefa glitanto, de la genuo ĝis la femuro. Ŝiaj basko kaj robo estas formitaj de la porcio de la dekliva tegmento doma.

Oka problemoj :

La plej longa vorto sendita estas :
NENIAMANIERE (en kiu oni kalkulas 18 vortojn).

DIVENIS : (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj.)

DUMÉZIL 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7 kaj 12 vortojn por la 8^a promo.
BASTOUL 2, 4, 5, 6, 7 » 11 » »
FINOT 2, 4, 5, 6, 7 » 11 » »
KARULINO 4, 5, 7 » 12 » »
BACQUET 2, 4, 5, 7 » 12 » »
FLOURENS 2, 4, 5, 7 » 7 » »
WARDEN 6, 7, 8 (li trovis 18 vortojn).
PHILIPPET 1, 2, 3, 4, 5
SOLICHON 2, 4, 5
SAQUET 7.

Klasigo por la unua kvaronjaro, kaj premioj :

Dumézil — 10 frankojn mone.

Bastoul — jarabono por la unua jaro de T. L. M.

Finot — albumo por fotografaĵoj.

Philippet — Botelo de « Miéline Gelson ».

Bacquet — duonjara abono por la unua jaro de T. L. M.

Florens — 24 belegaj alĝeriaj poŝtkartoj.

Mi lotmontris Bastoul antaŭ Finot kiuj havas similaĵon.

PREMIO SPECIALA.

Ĉar Sinjoro WARDEN trovis la plej longan solvon de la 8^a problemoj, mi sendas al li 15 poŝtkartojn propagandajn.

PROBLEMO 36^a (DE FINOT).

. R E . P I
. E G . L O
. T I . G I
. A N . O J
. P R . B I

Austataŭigu la punktojn per literoj kaj vi legos la nomon de io de ni ĉiuj tre amata.

La solvo estos akceptata ĝis la 30^a de Aprilo 1906^a.

Rim. Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Brunet Ch. 59, cours Victor-Hugo, Bordeaux.

Malgranda korespondado.

Al niaj artgekunlaborantoj. — Bonvolu plumdesegni kaj ne krajone, uzante nigran inkon (Hinan); tiom kiom eble, faru la originalojn de l' desegnaĵoj ĉirkaŭ trione pli grandaj ol la definitiva amplekso ĉar, tiel, la desegnalinoj estas pli sendifektaj post malpligrandigo.

So **A. T. Simper** (*Anglujo*). — En la proksima numero komencos enpresado de via tre interesa ilustrita raporto.

So **P. H.** (*Svedujo*). — Konsentite. Estos farata laŭ via deziro.

So **Mende** (*Alĝero*). — Tute artistaj estas viaj desegnaĵoj; komplimentojn kaj dankojn.

So **Otto Simon** (*Moravujo*). — Bone alvenis la letero de S^{no} B. v. S., dankon.

So **Gaston Paris** (*Francujo*). — Jes, mia deziro estis tiu, kiun vi divenis. Gratulojn pro la projektita Societo kaj dankon pro la rolo aljuĝita al « Tra la Mondo ».

So **Th Renard** (*Svisujo*). — Antaŭan dankon, kaj al vi ankaŭ sukceson en 1906.

So **Baissac** (*Konstantino*). — Volonte mi akceptas vian proponon pri via angla korespondantino.

So **C. J. Homburg** (*Holandujo*). — Antaŭen por « Diversaj sciencoj ».

So **Brunet** (*Francujo*). — Mi ricevis vian afiŝon, dankon. Gratulojn pro via agado. Ĝi povu skui la grandan ĉefurbon, Bordeaux, de l' sudokcidenta Francujo.

Ni dezirus koni adreson de Inĝeniero Kazi Girej kaj de S^o H. de Ladevèze.

So **Morgan** (*Rusujo*). — Via rakonto estas tre impresiga kaj la ilustraĵoj tre interesaj. Mi ricevis ankaŭ priskribon pri rusa « Bastille » o.

So **J. Meazzini** (*Italujo*). — Bonegan ideon vi havis sendante sciigojn pri la universala ekspozicio en Milano. Ni ricevis vian mensendon.

So **Paul Nylan**, (*Svedujo*). — Dankon pro via letero. Mi estas feliĉa vidi kian atenton vi kaj viaj amikoj donas al « Tra la Mondo. »

Soj **Clegg** kaj **Nicholl** (*Anglujo*) — Gratulojn pro via agado apud « Daily News. »

Niaj legantoj sendu verkaĵetojn ne enhavantajn pli ol 300 vortoj pri kiu ajn temo (Novaĵoj, Nuntempaĵoj...), al S^o Nicholl, 9. Throgmorton avenue, London, E. C.

A. M.

Nia konkurso pri abonoj.

Ho Ve! Ĝi ne havis multe pli da sukceso ol tiu malfermita poste, de nia kunfrato la franca « Esperanto ».

Tamen la premio: 50 frankoj *mon*e kaj 40 frankoj *stof*e estis kapabla instigi penadojn.

Tiu rezultato montras ke Esperantisto, pri la rilato de abonigo, estas kiel la anoj de naturaj landoj: antaŭ unu jaro, franca revuo tre interesa kaj bela nomita « Je sais tout » (mi ĉion scias), malfermis abonigan konkurson, kies unua premio konsistis el 1.200 frankoj *da vento*.

En la 4^a aŭ 5^a n^o, la administracio konigis ke la konkurso ĝis nun ne renkontis favoran akcepton de la gelegantaro. Kaj tamen la revuo estas treege legata!

Ni do ne miru pri la nesukceso de nia modesta konkurso kaj ni danku varme la amikojn, kiuj prenis sur sin la malfacilan taskon varbi abonantojn.

Krom Sroj Kuchler, el Francfort (*Germanujo*), kaj Morin (*Meksikujo*), kiuj persone subskribis opajn abonojn (6 kaj 10), du aliaj personoj nur atingis la nombron fiksitajn (6) por ricevi senpagan abonon: F^{ino} Flourens (*Francujo*); 9; kaj S^o Duyos (*Hispanujo*); 6.

Tiom pli ni dankas ilin, ke ni scias, per la malgranda nombro de niaj aliaj helpintoj kaj la ne malpli malgranda nombro de iliaj varbitoj, la malfacilecon de ilia agado.

Nia luksa eidono.

Multaj personoj deziras ricevi la revuon en tuboj rigidaj por ke ĝi estu tute ne difektita per la transporto.

Ni faros tiun sendaĵon al tiuj kiuj ĝin petos aldonante al sia peto unu frankon por kosto de l' tuboj.

Samtempe ni faros luksan eldonon sur papero ŝirmita. (speciala por luksaj ilustrataj eldonaĵoj) por tiuj kiuj aldonos la koston de l' papero l frankon.

Luksa eldono, sen tuboj: 10 fr.

Ordinara eldono, en tuboj: 9 fr.

Oni bonvolu rapidi sendi petojn kaj mendojn.

Oni povas havigi la luksan eldonon de la 6^a n^o

La Bona Pomvino

estas ege trinkinda! Ĝiaj gustume konsumantoj estas multaj, ĝiaj prave konsumantoj devus esti ĉiuj la aliaj, ĉar la drinkantoj de bona pomvino neniam timas la malsanadojn tiajn, kiaj la urina sablero, la gravelo kaj eĉ la podagro aŭ a reŭmatismo.

Sendadoj en ĉiujn landojn. Petu prezaron kaj sendmanieron al la « Cidrerie de Tabago », St-Nicolas de Redon. Loire inférieure. France.

Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.
Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprepare deĉifri kaj legi ĉion esperante skribitan » Enmetebraj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, eldonoj kaj receiveblaj por

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

LUEBLA

La „Pasio”

(Jesua Suferado).

Albumo de la « Pasio », enhavanta multajn ilustratajn foliojn, *nigre kaj kolore*, kaj kun klarigaj tekstoj kaj aro el 40 poŝtkartoj: 6 fr. anstataŭ 10.

La kolekto de l' 40 Poŝtkartoj, 3 fr. anstataŭ 5 fr.

Bela plenumo de nia interesa artikolo de l' 2^a n^o de « Tra la Mondo ». Turnu vin al abato E Petit, paroĥestro de Saint-Joseph, Nancy.

Archives générales d'Hydrologie de Climatologie et de Physiothérapie.

Enpresas regule artikolojn pri kaj por Esperanto.

Ĉefredaktoro: D^{ro} PAUL RODET.

Francuje: 5 fr., Alilande: 8 fr., ĉiujare — 19, Rue des Martyrs, Paris.

Anoncetoj.

So **A. V. Blagoveščenskij**, Vinnica, Poldolskoj gub. Ruslando, sciigas ke li eldonis propagandajn poŝtkartojn kaj kortoĵojn kun surskriboj multlingvaj. Li sendos volonte specimenojn.

Estis **prezeraroj** en la muziko de S^o Deshays (*Rondedancado*) de nia 6^a n^o. Oni devis legi, sur la 4^a liniaro anstataŭ la dua \sharp ; kaj *pala* anstataŭ *perla*.

Ekspozicioj

Esperantista Elbinga grupo » intencas fari grandan propagandon kaj petas poŝtkartojn, leterojn, gazetojn aŭ alian propagandamaterialon (S^o H. Greff, Ausserer Mühlendam n^o 97, Elbing, Westpreussen, Deutschland).

La grupo de **Amiens** organizas ekspozicion dum la ĝenerala ekspozicio okazanta en Amiens en 1906. Ĝi petas dokumentojn (S^o Tassencourt, rue d'Alger, Amiens).

So **Tabenski**, sciigas nin ke li sukcesis fondi en Vilna (*Rusujo*), filion de la S^o Esperanto de Peterburgo. La grupo intencas organizi ĉiamam ekspozicion por atentigi la loĝantaron de tiu grava urbo pri Esperanto. Oni bonvolu sendi al Prezidanto de l' « Vilna grupo esperantista » S^o V. Tabenski, Esperanton, per Eĵišiŝki, Vilna gub. (Rusujo), la sekvantajn dokumentojn:

La gazetaj redaktoroj, la eldonistoj kaj aŭtoroj — unu ekzempleron de siaj eldonaĵoj; la societoj, grupoj, profesoroj — la nomaron de siaj membroj, lernantoj; cirkulerojn, statutojn; korespondadojn kun sciigoj kaj fotografajoj aŭ poŝtkartoj pri moroj, tipoj, vivado, k. t. p., en sia lando; portretojn de komitatanoj, k. t. p.

La industriistoj reklamigantaj per Esperanto — specimenojn de siaj produktajoj kun cirkuleroj, tarifoj, k. t. p. La grupo iĝos ilia reprezentanto.

Fine, la grupo dezirus ricevi, se eble kelkajn produktaĵojn de esperantistaj artistoj por intermiksi kun dokumentoj nur esperantistaj.

Kiam kviteteo estos plene restarigita en Rusujo, tiu lando, pro diverseco de lingvoj, ludos certe gravan rolon en nia progresado. Ni do tre atentigas niajn legantojn pri tiu alvoko.

« T. L. M. ».

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonajn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARA BONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

ESPERANTO.

(Ĵurnalo): France kaj esperante. Unu numero 10 cent., 24 n-oj sinsekvaj 3 fr. Ĉe So Paul Berthelot, Cérêt, P. O., France. Tre rekomendinda al franclingvaj samideanoj. Aĉetebla en ĉiuj stacidomoj kaj ĉe l' kioskoj por vendado de ĵurnaloj.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava monato revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonege redaktata sub direktado de A. Jimenez Loira. Rakontoj pri hispanaj kutimoj kaj tradukoj laŭ famaj hispanaj aŭtoroj. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

ESPERO PACIFISTA.

Monato organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas konsiderataj kiel aliĝintoj al la Societo; tiu ĉi akceptas aliĝojn opajn. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. e., anglo-Esperanto, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

MEKSIKA LUMTURO.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Meksika societo por propagandi Esperanton.

Eliras 6 fojojn jare — 3 frankojn — Ĉe D^o A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla (Ver), Meksiko.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

Sendu mendojn kaj anoneojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT: EUGÈNE CAPÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto.

Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komencego de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lartiga, Lima (Peruo).

HOLANDA PIONIRO.

Holande kaj esperante. Organo de la novnaskiĝinta holanda Societo por propagando de Esperanto.

Tre subteninda por helpi movadon en Holando. Ĉe Drees Utterdijk, Hilversum, Holando.

ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe So L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe So Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; social-politika fakoj; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membrigo en la S-to «Espero») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St. Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S-to «Espero.»

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille'lo sistemo. 3 f. — Ĉe So Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N^o afrankita 0 f. 30 Francujo, 2 f.; alilande 2 f. 50. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ

La Falo de l'Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE et C^{ie}

102, rue de Richelieu, Paris.



ĴUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEL

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE

AUGUSTE MOXTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS

ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO

27-31, PASSAGE CHOISEUL, 27-31

M DCCCXV

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;

1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».